
# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE S.A.T.


http://www.satesperanto.org/ *** retadreso: satesperanto@free.fr



## POR LA PACO !

# S.A.T. ALIĜIS AL C.M.C.

## MONDA KOALICIO KONTRAŬ PAFAĴOJETOJ EL BOMBOJ, p. 130




Oktobro 2006 77-a jaro, n-ro 10 (1216)
MENSUEL / MONATA
ISSN 1163.0442 Prezo: 5 €

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

Sekve de Beograda Kongreso !

# S.A.T. ALIĜIS AL C.M.C.

## MONDA KOALICIO KONTRAŬ PAFAĴOĴETOJ EL BOMBOJ



*Interno de pafaĵoĵeta bombo*



*Pafaĵetoj sur tersurfaco*

Ni informas la membrojn de S.A.T. ke C.M.C. - Monda Koalicio kontraŭ la pafaĵoĵetoj el bomboj akceptis la aliĝon de S.A.T. al la Koalicio. Ni agu kontraŭ tiuj armiloj kiuj blinde frapas eĉ post la fino de la milito.

Por la Pacista Frakcio

Colette kaj André Weiss



*Eksplodo de pafaĵoĵeta bombo*

## El la redaktejo...



Karaj,
tiun ĉi numeron vi ricevas kun iom da prokrasto pro kelkaj teknikaj problemoj. En ĝi vi trovas ankaŭ la referendumilon por voĉdoni pri la kreo de la Eldonkooperativo. Nepre voĉdonu tuj kaj resendu ĝin por ke ni havu vian voĉon antaŭ la 31.12.2006. Dankon.

Kiel vi vidas, malgraŭ gravaj problemoj SAT daŭre aktivas. Ni ĵus aliĝis al Monda Koalicio kontraŭ pafaĵoĵetoj. Kunlaboru en tiu pacagado. Ankaŭ vi povas vidi ke sekve de nia invito jam kelkaj gekamaradoj pagis dumvivan SAT-Kotizon por helpi al solvo de aktuala problemo. Dankon al ĉiuj. Kompreneble tiu kotizo vere helpas nur se estas 25 plenaj kotizoj kaj la kotizoj kiuj vere kovras la membrokoston (25 x 52 €). Certe vi tion bone komprenas.

Ni atendas ke vi anoncu vin por la nova redakta komitato, ĉar tio estas tre urĝa kaj grava. Ĝis nun anoncis sin nur unu kamarado.

Atendante viajn reagojn, kamaradece salutas vin via

*Redaktoro*


Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesperanto@free.fr.
TTT-paĝoj: http://satesperanto.free.fr
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020 39
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA : **satx-s**
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin, Viola, C. Orsingher, Snajpero, I. Moĉilnik kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

❒

Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER
Abonnement annuel/jara abono France 55 €.
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
N° CPPAP 0510 G 86567
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.


# INFORMOJ AL LA MEMBRARO

Karaj gekamaradoj,

sekve de la kongresaj laboroj en Beogrado, la P.K. de SAT alprenis kelkajn decidojn :

a) **SENNACIULO - SES NUMEROJ JARE**
Por ŝpari monon, ni decidis ŝanĝi la aperritmon de nia Sennaciulo. Ĝis la fino de la jaro vi ricevos ĉiumonate Sennaciulon en la nuna formo kaj ekde la venonta jaro ni planas aperigi nur ses pli ampleksajn numerojn de la Nova Sennaciulo kiu en ĉiu numero enhavos apartan dosieron pri iu temo.
Tiun Novan Sennaciulon devus fari nova redakta skipo kiu kun la tuto de la forto de SAT normale devus kapabli oferti al la Esperantlingvio bonegan maldekstran revuon, larĝskale disvastigitan kun pli granda aŭdienco, ol ekzemple aliaj valoraj revuoj.
Ni jam vokis en la antaŭaj numeroj por la partopreno en tiu skipo sed ĝis nun sen respondo. Anoncis sin nur unu kamarado. La aktuala redaktoro proponas sin por la lingva kontrolo kaj la korektado de presprovaĵoj. **Do, por ke ni havu kompletan skipon kiu povos normale prepari kaj produkti la unuan numeron de la Nova Sennaciulo, necesas ke vi urĝe anoncu vin. Necesas trovi ĉefredaktoron, rubrikajn redaktorojn, enpaĝigiston, grafikiston ktp**. Ankaŭ necesas proponi la unuan temon kaj prepari dosieron por la unua numero kiu estus 32-paĝa.

b) **DETALA RAPORTO PRI KONGRESAJ LABOROJ**
Ĉar ni estas devigataj limigi la kvanton de "Asocia materialo" en la gazeto (postulo de la franca instanco pri presaĵoj), en tiu ĉi numero vi trovas nur resumon de niaj laborkunsidoj. Kompletan detalan raporton laŭ la kongresaj registraĵoj (10 horoj da registrita materialo), vi povos trovi en niaj retpaĝoj :http://www.satesperanto.org/, kaj elŝuti ĝin en PDF formato.

c) **REFERENDUMO**
Sekve al la Propono al la kongreso, kaj post la kongresa debato, vi trovas en tiu ĉi numero referendumilon por voĉdono pri la kreo de la eldona kooperativa fako de SAT. Necesas ke vi voĉdonu kaj resendu la voĉdonilon tiel ke ĝi atingu la sidejon antaŭ la 31-a de decembro 2006.

La P.K. de SAT